


CERBE kaj KORE



**KULTURA SUPLEMENTO
AL LA REVUO "PONTO" N-RO 118**

N-RO 19 (87), APRILO 2021

Enhavo

Originala poezio

Klara ilutoviĉ

Februara tago	3
Traŭmo	3
Grandan dankon, amikoj	4
Printempaj deziroj	5
Marte	5
Omaĝe al la 21-a Internacia konkurso de junaj muzikistoj “Ŝĉelkunĉik” (“Nuksrompulo”)	6

Datrevenoj de la rusa kulturo

135-jariĝo de Nikolaj Gumilov

Pri Nikolaj Gumilov	7
---------------------	---

Nikolao Gumilov

Soneto. <i>Trad. Tatjana Auderskaja</i>	8
La kruco. <i>Trad. Tatjana Auderskaja</i>	8
Rinocero. <i>Trad. Tatjana Auderskaja</i>	9
Ĝirafo. <i>Trad. Tatjana Auderskaja, Nikolao Gudskov</i>	10
Jaguaro. <i>Trad. Tatjana Auderskaja</i>	11
Maljuna konkeranto. <i>Trad. Tatjana Auderskaja</i>	12
La fondontoj. <i>Trad. Tatjana Auderskaja</i>	12
Elekto. <i>Trad. Tatjana Auderskaja</i>	13
Ludoj. <i>Trad. Tatjana Auderskaja</i>	14
“Ĵuris li al la Madono”... <i>Trad. Tatjana Auderskaja</i>	14
Don Juan. <i>Trad. Tatjana . Trad. Tatjana Auderskaja</i>	15
Soneto. <i>Trad. Espopore</i>	16
Poet’ . <i>Trad. Espopore</i>	16
La vorto. <i>Trad. Tatjana Auderskaja</i>	17
Arbaro. <i>Trad. Tatjana Auderskaja</i>	18
La sesa senso. <i>Trad. Nikolao Gudskov, Tatjana Auderskaja</i>	19

Tradukita poezio

Aleksandr Puŝkin

Profet’ . <i>Trad. Eŭgeno Georgiev (Espopore)</i>	21
Al Siberio. <i>Trad. Eŭgeno Georgiev (Espopore)</i>	22

Aleksej Apuĥtin

Muŝoj. <i>Trad. Eŭgeno Georgiev (Espopore)</i>	23
--	----

Tradukita prozo

Paŭlo Baĵov

La majstro-malakitisto. <i>Trad. Gennadij Ŝlepĉenko</i>	24
---	----

Libroj

<i>Valentin Melnikov</i> . Ni vivas malgraŭ ĉio	34
<i>Sergej Rublov</i> . Rusaj poetoj de la 20-a jc.	34

Kronviroza humuro

<i>Mikaelo Bronŝtejn</i> . “Super la enirejo Galeria”	36
---	----


Klara Ilutoviĉ (Elektrostalo)

**Februara tago
ĉe malsanuleja fenestro¹**

Densa neĝo kuŝas.
Februara suno
Verŝas sin avare
Al sorĉanta mild'.
Kaj l'okulojn tuŝas
Trankviliga nuno,
Vastiĝanta mare —
Ĉefenestra bild'.

Kronoj de abioj
Al ĉiel' rigardas,
Al spaceg' senranda,
Al senfina blu'.
Ŝvebas nubaj strioj,
Sunsubiro ardas,
Mond' fabele grandas
Je l' senmova flu'.

Februaro 2021



Traŭmo

Ni rapidas, ni ĉiam rapidas
Al laboro, infanoj, profit'.
Ĉe l' piedoj ne multe ni vidas
Dum kurado – flugad' sen hezit'.

Sed sub neĝo kaŝiĝas glacio –
Nevidebla malice danĝer',
Seniganta je simpla racio,
Dum falrisko kaj traŭm' estas ver'.

Kaj ĉe traŭmo sen dub' serioza
Iĝos vi unujara etul',
Kaj neniŭ kuŝado ripoza
Eĉ mildigos dolorojn de krur'.

Traktu viajn helpantojn amike,
Ne ofendu per stulta rifuz',
Help' el kor' venas kuracefike
Kaj fidinde, sen ajna misuz'.

¹ La 3 unuaj poemoj estas verkitaĵoj en malsanulejo, kien la aŭtoro trafis pro rompo de femurcerviko.

Post la operaci' nepre manĝu,
La konduto ne iĝu defi',
Ne turmentu, ne tedu, ne ŝarĝu
La amikojn, helpantajn al vi!

Kaj neniam ripetu erarojn,
Kiujn faris mi sen la dezir'!
Multajn nepardoneblajn fifarojn
Provokemos malsana eldir'.

Kiel ajn, kiom ajn vi rezonos,
Kiel ajn vin konsolos rutin',
Pli rapide l' amik' vin pardonos
Ol redempte pardonos vi vin.

Multajn pensojn, konvinkojn, decidojn
Trudas lito de grava malsan',
Retaksante admirojn kaj bridojn
Estu sana, samidean'!

Grandan dankon, amikoj!

Kun bonvolaj publikoj
Pli agrablas ol sen.
Grandan dankon, amikoj
Pro via subten'!

Ĉe l' karismo fascina
Ŝrumpas ajna korprem'.
Grandan dankon, Irina²
pro via helpem'!

Kor' la samideana
Estas vera vivgrac'.
Grandan dankon, Svetlana³
Pro via sagac'!

Via koro elana
Lumas varme de l' sent'.
Grandan dankon, Tatjana⁴
Pro via atent'!

Bonesperoj, efikoj,
Plivigliĝo sen fin'!
Grandan dankoj, amikoj,
Ĉar mi havas vin!

² Gonĉarova

³ Smetanina

⁴ Glaznica

Printempaj deziroj

Malvarmo forpasu,
Degelu neĝaroj,
Ne plu embarasu
Glatiasaj vojbaroj!

Printempo eklumu
Je nova espero,
La vivon brakumu
Senfresta libero!

Malica covid-o
Velkadu en plor',
Printempo kun rido
Ĝin pelu plu for!

Printempo promesu
Ĝojigi pri sanoj,
Alvoke impresu
Pli junaj elanoj!

Esperantistaro
Kuniĝu denove,
La lingva ĝojmaro
Vigliĝu bonmove!

Belvestu humoron
Printempa vivgrac',
Alsendu favoron
Printempo sen lac'!

Marte

Printempa sun' forpelos neĝon.
Alia jarsezono
Proklamos jam la novan reĝon
En hele verda krono.

Pli varme, forte sun' ridetos
Al longedorma tero
Kaj vekigis ĝin lumbrile pretos
Por nova vivlibero.

Kruela estis februaro –
En vojoj kurbaj-glitaj,
Vastege blanka neĝa maro,
Neĝdunoj montimitaj.

Printempa sun' forpelos fridon
Kiun ties agresivo,
Kaj pelu for ankaŭ covid-on
Pli pura iĝu l' vivo.

Printemp' animrektige venu
Kun siaj helaj veroj.
La nova jarsezono plenu
Je varmo, lum', esperoj.

Omaĝe al la 21-a Internacia konkurso de junaj muzikistoj “Ŝĉelkunĉik” (“Nuksrompulo”)

Infanoj ludas en malplena halo.
Aŭskulti eblas nur televidile.
La fina turno de l' konkursbatalo.
L' muziko fluas venke kaj jubile.

Peniga voj' al la muzika arto
L' infanojn sorĉis, vokis kaj alprenis.
Leviĝo al la pormuzika alto
Je la talento ilin frue benis.

Dekjaraj, dekduraraj muzikistoj.
L' infankonkurso novajn nomojn festas.
Kaj fakte je l' talent' kaj penpersistoj
Venkintoj ĉiuj konkursanoj estas!

Mirakle de l' sentem', plenumtekniko
L' infanoj kantas sian efektivon.
Talentajn korojn regas la muziko.
Covid ne rompas ĝian grandan vivon.

L' morgaŭa muzikista mondvizaĝo
Aprecos ĉiun hodiaŭan penon,
Kaj en la dume lernejana aĝo
Al hela regno de l' muzik' bonvenon!



Datrevenoj de la rusa kulturo

135-jariĝo de Nikolaj Gumilov



Nikolaj Stepanoviĉ Gumilov (3[15].04.1886 – 24.08.1921) estas unu el la plej popularaj rusaj poetoj de la “arĝenta epoko”. La unuaj verkoj aperis en la 1902, komence estis adepto de simbolistoj. En la 1911 estis kunfondinto de “Gildo de poetoj” – la nomo devis emfazi rilaton al la poezia kreado kiel al alta metio, postulanta profesiecon, kiun eblas lerni. En la 1912 li, kune kun Sergej Gorodeckij, proklamis *akmeismon* (de la greka ἀκμή – pinto), kiu kontraŭstaris al simbolismo. Krom ili, al la nova skolo apartenis tiaj famaj poetoj, kiel Anna Aĥmatova (la unua edzino de Gumilov), Osip Mandelŝtam, Vladimir Narbut ka. En 1912-13 jaroj akmeistoj eldonis propran literaturan revuon “Hiperboreo”.

Gumilov multe vojaĝis, minimume 3 foje estis en Afriko, la lastan fojon kun tasko de la Akademio de la sciencoj pri kolekto de etnografiaj materialoj kaj folkloro. Li vizitis Somalion kaj plej ŝatatan de li Abisenion (nuna Etiopio), kiu inspiris plurajn liajn poemojn.

Li partoprenis kiel volontulo, poste – suboficiro kaj fine oficiro la batalojn de la 1-a mondmilito, ricevis kelkajn ordenojn pro kuraĝo. Fine de la milito li estis en la rusa ekspedicia korpuso en Francio. Este monarkiisto, li malakceptis la revolucion de 1917, des pli la bolŝevistojn, sed en 1918-21 ne aliĝis al iu blankula armeo kaj okupiĝis pri literatura agado.

En 1921 li estis akuzita pri partopreno en kontrevolucia komploto kaj kune kun aliaj komplotintoj estis kondamnita al mortpafo. Ĉu la komploto reale ekzistis (estas opinio, ke ĝi estis nur provoko de la sekreta polico), kaj, se jes, kiomgrade Gumilov ĝin partoprenis, ekzistas diversaj versioj, por kiuj definitivaj pruvoj nun ne ekzistas. Ĉiuokaze, la tombo de la poeto ne konserviĝis.

Inter la 1924 kaj 1961 verkoj de Gumilov en Sovetio tute ne estis eldonataj, en la 1961-85 apartaj poemoj hazarde aperadis en periodaĵoj kaj literature-historiaj krestomatioj, kvankam en librobrotokantejoj kontraŭ grandaj prezoj eblis foje akiri la dumvivajn eldonojn. Tamen poemkolektoj de Gumilov en la jaroj de duonmalpermeso estis bone konataj al la ŝatantoj ĉefe dank’ al samizdato. Ekde 1986 oni denove abunde ekldonis liajn verkojn, inkluzive novtrovitajn.

La ĉefaj kolektoj de la poemoj de Gumilov estas “La vojo de konkerantoj” (1905), “Romantikaj floroj” (1908), “Perloj” (1910), “Fremda ĉielo” (1912), “Sagujo” (1916), “Lignofajro” (1918), “Porcelana pavliono” (1918), “Tendo” (1921), “Fajra kolono” (1921), rakontaro “Ombro de palmo” (1922), kritikaj eseoj “Leteroj pri la rusa poezio” (1923). Krome, li multe tradukis el la angla, franca kaj germana lingvoj.

La trajtoj de lia poezio estas strikteco de la ritmo, alteco de la tono, ŝato al ekzotikeco, fortaj personoj de konkerantoj kaj malkovrantoj de la novaj teroj kaj similaj herooj, mistikeco, iom da fantasto. En ĉiuj tempoj liaj poemoj estis adorataj de romantikemaj geadoleskuloj kaj gejunuloj.

Сонет

Как конквистадор в панцире
железном,
Я вышел в путь и весело иду,
То отдыхая в радостном саду,
То наклоняясь к пропастям и
безднам.

Порою в небе смутном и
беззвездном
Растет туман... но я смеюсь и жду,
И верю, как всегда, в мою звезду,
Я, конквистадор в панцире
железном.

И если в этом мире не дано
Нам расковать последнее звено,
Пусть смерть приходит, я зову
любую!

Я с нею буду биться до конца
И, может быть, рукою мертвеца
Я лилию добуду голубую.

1905

Крест

Так долго лгала мне за картою карта,
Что я уж не мог опьяниться вином.
Холодные звезды тревожного марта
Блédнели одна за другой за окном.

В холодном безумьи. в тревожном
азарте
Я чувствовал, будто игра эта — сон.
«Весь банк — закричал — покрываю
я в карте!»
И карта убита, и я побежден.

Я вышел на воздух. Рассветные тени
Бродили так нежно по нежным
снегам.
Не помню я сам, как я пал на колени,
Мой крест золотой прижимая к
губам.

— Стать вольным и чистым, как
звездное небо,
Твой посох принять, о, Сестра
Нищета,
Бродить по дорогам, выпрашивать

Soneto

La kavaliro en kiraso fera,
Mi gaje iras al lontana voj'.
Jen mi ripozas en ĝarden' kun ĝoj',
Jen proksimiĝas al abism' mistera.

En la ĉiel', senstela kaj severa,
Nebul' aperas nigra foj-de-foj.,
Sed ridas mi, kaj kredas je la ĝoj',
Kaj l' vojon sekvas kun arog' fiera.

Deziras mi ekregi vin, destin'!
Kaj se aperos Morto en la fin' –
Alvenu ĝi. Mi pretas al batalo.

Kun ĝi mi luktos ĝis la lasta spir'
Kaj prenos, en plenumo de l' aspir',
Lilion bluan el la Morta Valo.

Trad. Tatjana Auderskaja

La kruco

Senĉese trompadis min kart' post karto,
Kaj vin' jam ne savis de senesper'.
La steloj malvarmaj, morozaj de marto
Paliĝis en alt' super nigra ter'.

En morna frenezo, pasio ekscita,
Jam profundiginta en luda hazard',
Mi ludis va-bankon – sed karto
murdata.
Jen kvazaŭ en sonĝo, kun svena rigard'

El dom' mi foriris. La helo aŭrora
Tenere videblis en nokta angor'.
Mi surgenuiĝis sur neĝ' blukolora
Premante al lipoj la krucon el or'.

Mi estu libera, malriĉa kaj pia,
Almozon mi petu je l' nomo de Krist',
Vagante laŭ vojoj kun psalm' eklezia
Kaj kruc', la simbol' de l' Ĉiela
Ekzist...

хлеба,
Людей заклиная святыней креста! —

Мгновенье... и в зале веселой и шумной
Все стихли и встали испуганно с мест,
Когда я вошел, воспаленный, безумный,
И молча на карту поставил мой крест.

1906

Носорог

Видишь, мчатся обезьяны
С диким криком на лианы,
Что свисают низко, низко,
Слышишь шорох многих ног?
Это значит – близко, близко
От твоей лесной поляны
Разъяренный носорог.

Видишь общее смятенье,
Слышишь топот? Нет сомненья,
Если даже буйвол сонный
Отступает глубже в грязь.
Но, в нездешнее влюбленный,
Не ищи себе спасенья,
Убегая и таясь.

Подними высоко руки
С песней счастья и разлуки,
Взоры в розовых туманах
Мысль далеко уведут,
И из стран обетованных
Нам незримые фелуки
За тобою приплывут.

1907

Moment?... En la halo gajplena kaj vanta
Ekregis subite silent' kaj horor'.
Mi venis senbrida, pasia, tremanta
Kaj metis sur karton la krucon el or'.

Trad. Tatjana Auderskaja


Rinocero

Vidas vi, ke la simioj
Sur lianoj, kun vekrioj
Kiel longa kavalkado
Kuras, kuras en horor'?
Vi komprenu, ke sur pado
Penetrante tra folioj
Rinocer' ĝin pelas for.

En paniko eĉ bubalo
Retiriĝas al ĝangalo,
Piedfrapas la bestaro
Sin savante de la mort'.
Malamik' de l' ordinaro,
Vin ne kaŝu vi en valo,
Jen alvenis via sort'.

Levu manojn al ĉielo,
Kaj de tie, el la belo,
Tra nebul' de ĝoj' kaj ploro
Venos ŝipoj kun la kant'.
Vi forgesos pri angoro
Kaj sub rozkolora velo
Flugos al beata land'.

Trad. Tatjana Auderskaja



Жираф

Сегодня, я вижу, особенно грустен
твой взгляд,
И руки особенно тонки, колени
обняв.
Послушай: далёко, далёко, на озере
Чад
Изысканный бродит жираф.
Ему грациозная стройность и нега
дана,
И шкуру его украшает волшебный
узор,
С которым равняться осмелится
только луна,
Дробясь и качаясь на влаге широких
озер.

Вдали он подобен цветным парусам
корабля,
И бег его плавлен, как радостный
птичий полет.
Я знаю, что много чудесного видит
земля,
Когда на закате он прячется в
мраморный грот.

Я знаю веселые сказки таинственных
стран
Про черную деву, про страсть
молодого вождя,
Но ты слишком долго вдыхала
тяжелый туман,
Ты верить не хочешь во что-нибудь,
кроме дождя.

И как я тебе расскажу про
тропический сад,
Про стройные пальмы, про запах
немыслимых трав...
Ты плачешь? Послушай... далёко, на
озере Чад
Изысканный бродит жираф.

1907

La ĝiraf

Hodiaŭ mi vidas angoron en via
rigard',
La brakoj subtilaj senmove min petas
pri sav'...
Aŭskultu, jen fore, ĉe bordo de Ĉad'
Vagadas gracia ĝiraf'.

Langvoran gracilon kaj svelton li
havas ĝis nun,
Sur felo de li estas rava mirakl' -
arabesk',
Simila al tiu, per kiu ornamas la lun'
Surfacon de lagoj, brilantaj pro la
fosforesk'.

Imitas li ŝipon kun veloj de bunta
kolor',
Kaj lia kurado similas al flugo de bird'
Kantanta plengŝoje. Kaj kiam ekkuras li
for,
La sun' estingiĝas, kliniĝas kaj velkas
la mirt'.


Mi scias la gajajn fabelojn de fora
landar'
Pri nigra reĝino, pri amo de l' arda
junul'...
Sed vi tro delonge suferis en morna
malklar',
Ne volas vi kredi al io, krom pluv' kaj
nebul'.

Nu kiel priskribu mi sudan ĝardenon
sen pad',
Odoron de l' herboj, la palmojn,
belecon de pav'...
Vi ploras... aŭskultu, jen fore, ĉe bordo
de Ĉad'
Vagadas gracia ĝiraf'.

Trad. Tatjana Auderskaja

Ĝiraf

Triston apartan hodiaŭ mi vidas en la
rigardad',
Brakojn vi plektas kvazaŭ ne eblas la sav',



Aŭdu: tre fore, tre fore, ĉe la lago Ĉad'
Vagas gracia ĝiraf'.

Estas dotita ĝi de svelto kaj gracila
aŭdac',
Felon de ĝi ornamas tute magia dekor',
Povus egali al kiu nur la laga surfac',
Kie en lunaj reflektaj alternas nigro kaj
or'.

De malproksim' ĝi similas velojn
buntajn de ŝip',
Kuras ĝi flue kiel birdo al la horizont',
Multaj mirakloj, mi scias, vespere
kaŝiĝas kun ĝi
Dum sunsubiro en ŝtona la groto en
mont'.

Konas mi gajajn fabelojn el land' de
mister'
Pri nigra virgin kaj pasio de la juna
reĝ'.
Sed ja pro spiro longa nur per la
nebula aer'
Kredi ne volas vi je io krom pluvo kaj
neĝ'.

Kiel rakonti al vi pri tra tropikoj
vagam'
Palma sveltec', herbodora miraklo kaj
rav' ...
Ploras vi, ĉu? Aŭskultu... ĉe la lago
Ĉad'
Vagas gracia ĝiraf'.

Trad. Nikolao Gudskov

Ягуар

Странный сон увидел я сегодня:
Снилось мне, что я сверкал на небе,
Но что жизнь, чудовищная сводня,
Выкинула мне недобрый жребий.

Превращен внезапно в ягуара,
Я сгорал от бешеных желаний,
В сердце — пламя грозного пожара,
В мускулах — безумье содроганий.

И к людскому крался я жилищу
По пустому сумрачному полю
Добывать полуночную пищу,
Богом мне назначенную долю.

Jaguaro

Vekis min hodiaŭ song' terura:
Kvazaŭ mi brilegis en ĉielo,
Sed la sort', malica kaj tortura,
Min forigis el la astra helo.

Transformita tuj al leopardo
Kaj freneza pro dezir' akuta,
Tremis mi de l' flamiĝanta ardo,
Strebis mi al sanga persekuto.

Kaj al loko, kie loĝas Homo,
Mi kaŝiris, dum mallum' permesis,
Por akiri en vilaĝa domo
Manĝon, kiun Di al mi promesis.

Но нежданно в темном перелеске
Я увидел нежный образ девы
И запомнил яркие подвески,
Поступь лани, взоры королевы.

«Призрак Счастья, Белая
Невеста»...
Думал я, дрожащий и смущенный,
А она промолвила: «Ни с места!»
И смотрела тихо и влюбленно.

Я молчал, ее покорный кличу,
Я лежал, ее окован знаком,
И достался, как шакал, в добычу
Набравшим яростным собакам.

А она прошла за перелеском
Тихими и легкими шагами,
Лунный луч кружился по подвескам,
Звезды говорили с жемчугами.

1907


Sed sur voj', pasante tra bosketo,
Ekaperis hela junulino.
Min impersis svelta silueto,
Paŝ' de cerv', rigardo de reĝino.

Flustris mi: "Fantomo de la ĝojo,
Dia fianĉin', beleco sankta!"
Kaj finiĝis tie mia vojo,
Haltis min ŝi per rigard' amanta.

Mi silentis ĉe piedoj ŝiaj,
Mi obeis al ordon' senvorta,
Kaj al mordoj de hundar' rabia
Lasis min, senpova kaj senvorta.

Dume ŝi foriris el bosketo
Per la paŝ' tenera de vizio,
Balanciĝis svelta silueto,
Perloj brilis en la lunradio.

Trad. Tatjana Auderskaja



Старый конквистадор

Углубясь в неведомые горы,
Заблудился старый конквистадор,
В дымном небе плавали кондоры,
Нависали снежные громады.

Восемь дней скитался он без пищи,
Конь издох, но под большим
уступом
Он нашел уютное жилище,
Чтоб не разлучаться с милым
трупом.

Maljuna konkeranto

En montaro alta, nekonata
Misvojiĝis kavalir' maljuna.
Ŝvebis super li kondor' malsata,
Neg' malvarmis sub la lumo luna.

Pelis lin malsato en vagadon,
Mortis la ĉeval' en tago oka,
Kaj por ne forlasi kamaradon,
Restis li apude, sub la roko.

Там он жил в тени сухих смоковниц
Песни пел о солнечной Кастилье,
Вспоминал сраженья и любовниц,
Видел то пищали, то мантильи.

Как всегда, был дерзок и спокоен
И не знал ни ужаса, ни злости,
Смерть пришла, и предложил ей
войн
Поиграть в изломанные кости.

1908

Основатели

Ромул и Рем взошли на гору,
Холм перед ними был дик и нем.
Ромул сказал: «Здесь будет город».
«Город, как солнце» — ответил Рем.

Ромул сказал: «Волей созвездий
Мы обрели наш древний почет».
Рем отвечал: «Что было прежде,
Надо забыть, глянем вперед».

«Здесь будет цирк, — промолвил
Ромул, —

Здесь будет дом наш, открытый
всем».

«Но надо поставить ближе к дому
Могильные склепы» — ответил Рем.

1908

Sidis li sub olda sikomoro,
Rememoris sunon kaj Kastiljon,
Songis pri bataloj kaj amoro,
Vidis jen fusilon, jem mantiljon.

Estis li fiera kaj trankvila,
Ne timigis lin venonta sorto.
Venis mort'; kaj per la man' facila
Ludis li vetkubon kun la morto.

Trad. Tatjana Auderskaja

La fondontoj


Romul kaj Rem atingis supron
De l' muta monto, nuda, sen sem'.
Romul diris: "Mi fondos urbon!" –
"Urban potencan!", – respondis Rem.

Romul diris: "Laŭ vol' de l' dioj
Ni reakiris brilon de glori!"
– "Ni forgesu pri ambicioj, -
– Rem respondis. – Ek al labor'!"

"Tie konstruos mi, – diris Romul, -
Jen cirkon, domon laŭ mia skemo".

– "Tamen, alproksimigu al domo
– Kriptejojn kun tomboj" –
respondis Rem.

Trad. Tatjana Auderskaja



Выбор

Созидающий башню сорвется,
Будет страшен стремительный лет,
И на дне мирового колодца
Он безумье свое проклянет.

Разрушающий будет раздавлен,
Опрокинут обломками плит,
И, Всевидящим Богом оставлен,
Он о муке своей возопит.

А ушедший в ночные пещеры
Или к заводам тихой реки
Повстречает свирепой пантеры
Наводящие ужас зрачки.

Не спасешься от доли кровавой,
Что земным предназначила твердь.
Но молчи: несравненное право -
Самому выбирать свою смерть.

1908

Игры

Консул добр: на арене кровавой
Третий день не кончаются игры,
И совсем обезумели тигры,
Дышут древнею злобой удавы.

А слоны, а медведи! Такими
Опьянелыми кровью бойцами,
Туром, бьющим повсюду рогами,
Любовались едва ли и в Риме.

И тогда лишь был отдан им
Пленный,
Весь израненный, вождь аламанов,
Заклинатель ветров и туманов
И убийца с глазами гиены.

Как хотели мы этого часа!
Ждали битвы, мы знали — он
Смелый.
Бейте, звери, горячее тело,
Рвите, звери, кровавое мясо!

Но, прижавшись к перилам дубовым,
Вдруг завыл он, спокойный и
Хмурый,

Elekto

Detruantan dispremos la plato
El la dom', detruata de li.
Krios li en la mond' senkompata,
Sed por li restos surda la Di'.

Konstruanta defalos de l' muro,
Estos longa sufera falad'.
Li ne finos konstruon de l' turo,
Li malbenos la strebon al alt'.

Forirantan al paca rivero
Plu ne savos densega ĝangal':
Lin renkontos rabia pantero
Kaj alkuros malica ŝakal'.

Ne evitos vi sorton kruelan,
Kiun planas por vi la destin'.
Sed aprezu vi rajton plej belan:
Mem elekti la morton por si!

Trad. Tatjana Auderskaja

Ludoj

Dioj gloru vin, niaj konsuloj!
Sendis vi al aren' elefantojn,
Ursojn, tigrojn per ardo flagrantajn
Kun frenezaj pro sango okuloj.

Ne ekvidus ni ja eĉ en Romo
Tian lukton teruran kaj belan.
Trian tagon ni spektas kruelan
Ludon, best' kontraŭ best', sed sen
homo.

Kaj fin-fine al sanga areno
Estis olda sorĉist' elĵetita,
Estro de alemanoj kaptita,
La murdist' kun rigard' de hieno.

Ho, ni tiel atendis la feston,
Sciis ni, li fiera kaj brava!
Mordu, bestoj! Nenio jam sava
Por li restis. Disŝiru lin, bestoj!

Sed subite, al ni sen atento,
Li ekhurlis, kvieta kaj morna,
Kaj fortunis sin bov' akrokorna,
Tigroj falis en tima silento.

И согласным ответили ревом
И медведи, и волки, и туры.

Распластались покорно удавы,
И упали слоны на колени,
Ожидая его повелений,
Поднимали свой хобот кровавый.

Консул, консул и вечные боги,
Мы такого еще не видали!
Ведь голодные тигры лизали
Колдуну запыленные ноги.

1908

Он поклялся в строгом храме
Перед статуей Мадонны,
Что он будет верен даме,
Той, чьи взоры непреклонны.

И забыл о тайном браке,
Всюду ласки расточая,
Ночью был резан в драке
И пришел к преддверьям рая.

«Ты ль в Моем не клялся храме, —
Прозвучала речь Мадонны, —
Что ты будешь верен даме,
Той, чьи взоры непреклонны?»

Отойди, не эти жатвы
Собирает Царь Небесный.
Кто нарушил слово клятвы,
Гибнет, Богу неизвестный».

Но, печальный и упрямый,
Он припал к ногам Мадонны:
«Я нигде не встретил дамы,
Той, чьи взоры непреклонны».

1909

Дон Жуан

Моя мечта надменна и проста:
Схватить весло, поставить ногу в
стремя
И обмануть медлительное время,
Всегда лобзая новые уста.

А в старости принять завет Христа,
Потупить взор, посыпать пеплом

Kiom ni, ho konsuloj, ekmiris!
Obeeme subigis la rostrojn
Elefantoj, kaj lupoj la vostojn
Pro la sango malsekajn, subtiris.

Ho konsuloj kaj Dioj eternaj!
Ĵuras ni, ke bestaro rabia
Al sorĉisto silenta kaj pia
Lekis krurojn kun ĝemoj konsternaj!

Trad. Tatjana Auderskaja

* * *

Ĵuris li al la Madono,
Ke fidele, kun atento
Servos li al Damo bona,
Necedema por la tento.
Sed perdiĝis sankta ligo
Dum diboĉoj en Parizo...
Pereinte pro intrigo
Venis li al Paradizo.

Voĉ' eksonis de l' Madono:
“Ĵuris vi, ke kun atento
Servos vi al Damo bona,
Necedema por la tento.

Vi, ho ve, ne apartenas
Al la puraj en animo.
Kiu voton ne subtenas —
— For de l' Paradiza limo! “

Sed petegis li Madonon,
Konfesante kun lamento:
“Mi nenie trovis bonan
Damon, firman kontraŭ tento!”

Trad. Tatjana Auderskaja

Don Juan

Mi revas kun arogo kaj fier'
Batali pro la frukt' malpermesata,
Hastante ĉiam kun pasi' malsata
Al nova amo, nova vivprosper'.

Kaj en oldeco veni al la ver'
De l' Kristanismo, pura kaj beata,

темя
И взять на грудь спасающее бремя
Тяжелого железного креста!

И лишь когда средь оргии победной
Я вдруг опомнюсь, как лунатик
бледный,
Испуганный в тиши своих путей,

Я вспоминаю, что, ненужный атом,
Я не имел от женщины детей
И никогда не звал мужчину братом.

1910

Сонет

Я, верно, болен: на сердце туман,
Мне скучно всё – и люди, и
рассказы,
Мне снятся королевские алмазы
И весь в крови широкий ятаган.

Мне чудится (и это не обман),
Мой предок был татарин
косоглазый,
Свирипый гунн... Я веяньем заразы,
Через века дошедшей, обуян.

Молчу, томлюсь, и отступают стены:
Вот океан, весь в ключьях белой
пены.

Закатным солнцем залитый гранит

И город с голубыми куполами.
С цветущими жасминными садами,
Мы дрались там... Ах, да! Я был
убит.

1912

Поэт

Я слышал из сада, как женщина
пела,
Но я, я смотрел на луну.

И я никогда о певице не думал,
Луну в облаках полюбив.

Не вовсе чужой я прекрасной
богине:
Ответный я чувствую взгляд.

Al monaĥej' malriĉa, nekonata
Foriri, kvazaŭ al la Sankta Ter'.

Sed kiam mi, subite, inter kantoj
Kaj krioj de diboĉoj triumfantaj
Rekonsciiĝos, kvazaŭ somnambul',

Mi ekmemoros, ke en vivo vana
Ne havis mi amikojn, sentaŭgul',
Kaj ne feliĉis pro ridet' infana.

Trad. Tatjana Auderskaja

Soneto

Animon mian, kvazaŭ en malsan' ,
Tedegas vortoj kaj preterirantoj.
En song' min kaptas reĝaj diamantoj
Kaj per la sang' kovrita jatagan'.

Mi vidas (kaj ne estas tio ŝajn'):
Praul' de mi – tatar' el iu bando ,
Sovaĝa kaj horora hun' , giganto...
Tra l' jaroj li salutas min per man'.

Pestego tiu incitas min terure;
Jen ocean' kaj ŝaŭm'; kaj falas muroj.
La sunsubiro brilas sur granit'...

Kupoloj bluaj en la urb' , haveno,
Kaj la ĝardenoj plenaj de jasmeno,
Batalis ni... Ha, jes! Li buĉis min.

Trad. Espopore

Poet'

Mi aŭdis ĝardene virinan kantadon,
Sed mi, mi rigardis al Lun' .

Kaj mi ja neniam pripensis ĉi inon,
Amante la Lunon en nub' .

Al l' rava diino ne tute mi fremdas:
Mi sentas okulojn de ŝi.

Ни ветви дерев, ни летучие мыши
Не скроют меня от него.

Во взоры поэтов, забывших про
женщин,
Отрадно смотреться луне,

Как в полные блеска чешуи
драконов,
Священных поэтов морей.

*Свободный перевод из Чжан Жо-
Сюя*

1918

Слово

В оный день, когда над миром
новым
Бог склонял лицо Свое, тогда
Солнце останавливали словом,
Словом разрушали города.

И орел не взмахивал крылами,
Звезды жались в ужасе к луне,
Если, точно розовое пламя,
Слово проплывало в вышине.

А для низкой жизни были числа,
Как домашний, подъяремный скот,
Потому, что все оттенки смысла
Умное число передает.

Патриарх седой, себе под руку
Покоривший и добро и зло,
Не решаясь обратиться к звуку,
Тростью на песке чертил число.

Но забыли мы, что осиянно
Только слово средь земных тревог,
И в Евангелии от Иоанна
Сказано, что слово это Бог.

Мы ему поставили пределом
Скудные пределы естества,
И, как пчелы в улье опустелом,
Дурно пахнут мертвые слова.

1919

Nek branĉoj de arboj, nek aĉaj
vespertoj
Min kaŝas de ŝia rigard' .

Al de la poetoj okulaj speguloj
Delicas rigardaj por Lun' ,

Simile al skvamoj brilantaj de drakoj,
La sakraj poetoj de l' mar' .

Libera interpreto laŭ Zhang Ruoxu

Trad. Espopore

La vorto

Kiam al la mond' ne sendis punon
Di' potenca, Mastr' de nia sort',
Oni per la Vort' haltigis sunon,
Urbojn pereigis per la Vort' .

Ne arogis suprenflugi aglo,
Kaj timeme tremis la stelar',
Kiam Vort', mistero kaj miraklo,
Sur ĉielo brilis en malklar' .

Kaj por viv' kutima restis nombro,
Obeema, kiel bona brut',
Tute klare ja, sen iu ombro
Sencon montras ĝi en plena mut' .

Jam scianta bonon kaj malbonon,
Patriark' meditis en silent' .
Ne kuraĝis li alvoki sonon,
Nombron li surstrekis kun prudent' .

Sed forgesis ni, ke estas gracia
Nur la Vort' en tera maltrankvil';
Apostolo Iohan' sagaca
Diris, ke la Vorto estas Di' .

Tamen ni ĝin metas inter limoj
De mizer' natura kun obstin',
Kaj mortintaj vortoj, velkaj rimoj
Putras solaj meze de ruin' .

Trad. Tatjana Auderskaja

Лес

В том лесу белесоватые стволы
Выступали неожиданно из мглы.

Из земли за корнем корень выходил,
Точно руки обитателей могил.

Под покровом ярко-огненной листвы
Великаны жили, карлики и львы,

И следы в песке видали рыбаки
Шестипалой человеческой руки.

Никогда сюда тропа не завела
Пэра Франции иль Круглого Стола,

И разбойник не гнезвился здесь в
кустах,
И пещерки не выкапывал монах –

Только раз отсюда в вечер грозовой
Вышла женщина с кошачьей
головой,

Но в короне из литого серебра,
И вздыхала и стонала до утра,

И скончалась тихой смертью на заре,
Перед тем как дал причастье ей
кюре.

Это было, это было в те года,
От которых не осталось и следа.

Это было, это было в той стране,
О которой не загредишь и во сне.

Я придумал это, глядя на твои
Косы – кольца огневющей змеи,

На твои зеленоватые глаза,
Как персидская больная бирюза.

Может быть, тот лес – душа твоя,
Может быть, тот лес – любовь моя,

Или, может быть, когда умрем,
Мы в тот лес направимся вдвоем.

1919

Arbaro

La blankantaj arbotrunkoj en arbar'
Tre similis al la manoj de kadavr',

Kaj radikoj, aperantaj el la ter',
Montris vojon por iranta al infer'.

Sub folioj ruĝe-flavaj de arbust'
Grandeguloj loĝis, nanoj kaj mangust',

Kaj en sablo oni vidis post la ŝtorm'
Spuron de pied' sesfingra de la hom'.

Sed neniam tie loĝis kavaler',
Nek rabisto, nek riĉulo el Kair'...

Unufoje nur, vestita en brokat',
Venis ino kun la kapo de la kat',

Sed kronita per arĝenta diadem'...
Ĝis mateno ŝi suferis kun la ĝem'

Kaj silente mortis antaŭ la aŭror',
Kiam benis paroĥanojn la pastor'.

Tio estis, iam estis en pratemp',
Kiam regis sur la tero la printemp',

Tio estis, iam estis en la land' –
Nur en sonĝ' al ni videblas ĝia rand'.


Mi elpensis tion, rigardante vin,
La okuloj ebrigas min sen vin',

La okuloj kun koloro de turkis',
Harplektaĵoj ruĝaj, buŝo por la kis'...

Eble, ĉi-arbar' – anim' de vi,
Eble, ĉi-arbar' – la am' de mi.

Aŭ probable, kune post la mort'
Nin venigos tien nia sort'.

Trad. Tatjana Auderskaja



Шестое чувство

Прекрасно в нас влюбленное вино
И добрый хлеб, что в печь для нас
садится,

И женщина, которою дано,
Сперва измучившись, нам
насладиться.

Но что нам делать с розовой зарей
Над холодеющими небесами,
Где тишина и неземной покой,
Что делать нам с бессмертными
стихами?

Ни съесть, ни выпить, ни
поцеловать.

Мгновение бежит неудержимо,
И мы ломаем руки, но опять
Осуждены идти всё мимо, мимо.
Как мальчик, игры позабыв свои,
Следит порой за девичьим купаньем
И, ничего не зная о любви,
Всё ж мучится таинственным
желаньем;

Как некогда в разросшихся хвощах
Ревела от сознания бессилья
Тварь скользкая, почуя на плечах
Еще не появившиеся крылья;
Так, век за веком — скоро ли,
Господь? —

Под скальпелем природы и
искусства,

Кричит наш дух, изнемогает плоть,
Рождая орган для шестого чувства.

1920



La sesa senso

Belegas vino, kiu amas nin,
En forno bakiĝanta bona pano,
Kaj ankaŭ turmentanta nin virin',
Donanta, tamen, poste ĝuan amon.

Sed kion faru ni pri ruĝo de aŭror'
En la malvarma alta firmamento
Kun la kviet' senlima, kaj pri la valor'
De la senmorta poezia testamento?

Ne eblas manĝi, trinki, kisi en pasi',
Momento tuj senspure malaperas,
Impetas ni kun ve' — sed la vizi'
De la kompren' preteras kaj preteras.

Kiel knabet', sinforĝesinte por la hor',
Knabinojn gapas baniĝantajn en rivero,
Nenion dume komprenanta pri amor',
Jam turmentiĝas por dezirmistero;

Kiel mukoza ul' sub prafilik',
Strebanta nekonscie alton montan,
Per blek' senpova kaj per dorsa tik'
Aŭguris venon de flugil' estonta;

Do, tiel dum epokoj, puŝ' post puŝ',
Sub la lancet' de la naturo, arto, menso,
Torturas karnon kaj spiriton la akuŝ'
De la organo por la sesa senso.
Trad. Nikolao Gudskov

La sesa sento

La vin' benita feliĝigas nin,
La pan' fidela nutras ĉiufuje,
Kaj plej mirindas sur la ter' virin':
Pro ŝi suferas ni, kaj poste ĝojas.

Sed kiam sur malvarma firmament'
Aŭroro palas en kviet' solena,
En la anim' vekigiĝas kiu sent'?'
Por poezio kiu sens' konvena?

Ne taŭgas flar', palpado kaj sapor',
Momento kuras preter ni senbride,



Kaj ni etendas manojn kun angor'
Por vane peni kapti ĝin avide.

Kiel la knabo juna kun ador'
Virinon nudan sekvas per rigardo,
Malgraŭ ĉasteco sia kaj pudor'
Tremante pro nekomprenebla ardo,

Kiel en pradensejo de lias'
Reptilo glita muĝis en sufero,
Strebante al ĉiel' per peza mas',
Sed sen flugil' rampante sur la tero,

Jen tiel, pro naturo kaj la art',
Post jaro jar', jarcento post jarcento
Kriegas la spirit', suferas nia karn'
En nasko de organ' por sesa sento.

Trad. Tatjana Auderskaja



Tradukoj de Espopore (Eŭgenij Georgiev), Kazahio



Aleksandr Puŝkin (1799-1837)

Пророк

Духовной жаждою томим,
В пустыне мрачной я влачился,
И шестикрылый серафим
На перепутье мне явился;
Перстами легкими как сон
Моих зениц коснулся он:
Отверзлись вещие зеницы,
Как у испуганной орлицы.
Моих ушей коснулся он,
И их наполнил шум и звон:
И внял я неба содроганье,
И горний ангелов полет,
И гад морских подводный ход,
И дольней лозы прозябанье.
И он к устам моим приник,
И вырвал грешный мой язык,
И празднословный и лукавый,
И жало мудрыя змеи
В уста замершие мои
Вложил десницею кровавой.
И он мне грудь рассек мечом,
И сердце трепетное вынул,
И угль, пылающий огнем,
Во грудь отверстую водвинул.
Как труп в пустыне я лежал,
И бога глас ко мне воззвал:
«Восстань, пророк, и виждь, и
внемли,
Исполнись волею моей,
И, обходя моря и земли,
Глаголом жги сердца людей».

1826

Profet'

Spirite tre soifa, mi
En la dezerto malespera
Vagadis, kaj ĉe l' vojkruciĝ'
Aperis ĉefanĝelo pera.
Mildege, kvazaŭ papili' ,
Pupilojn miajn tuŝis li:
Kaj malfermiĝis la okuloj
Por novaj huloj de aŭguroj.
Orelojn miajn tuŝis li,
Aŭdebla iĝis la ali' :
Min tuj plenigis trem' ĉiela,
De l' fora vito vegetad' ,
De l' maraj vermoj navedad' ,
Kaj sferoj de l' anĝela belo.
Min kaptis ĉiopova man'
Kaj mia vanta peka lang'
For elŝitita estis, ruza.
Anstataŭ al la sanga buŝ'
Serpentan langon per la puŝ'
Li metis por la ŝaĝa uzo.
Kaj mian sinon trafis glav',
El brusto mia oscedanta
Li koron prenis. Postenhav'
Fajrarda venis, sukcedante.
Mi kuŝis, kvazaŭ jam mortint' ,
Kaj tiam Di' alvokis min:
"Revivu, vi, profet' de l' mondo.
Ek! Vidu, aŭdu, ardu plu!
Kaj per fervora vort' estonta
Flamigu koron de ajnul'... "

В Сибирь

Во глубине сибирских руд
Храните гордое терпенье,
Не пропадет ваш скорбный труд
И дум высокое стремление.

Несчастью верная сестра,
Надежда в мрачном подземелье
Разбудит бодрость и веселье,
Придет желанная пора:

Любовь и дружество до вас
Дойдут сквозь мрачные затворы,
Как в ваши каторжные норы
Доходит мой свободный глас.

Оковы тяжкие падут,
Темницы рухнут — и свобода
Вас примет радостно у входа,
И братья меч вам отдадут.

1827

Al Siberio

En la profund' de ĉia erc'
Vin helpos sole pacienco,
Ne estos vana ĉi ekzerc'
Kaj alta streb' de l' pens-esenco.

De malfeliĉo je ekstrem'
Espero, ho, fratin' fidela,
Plenigos vin per ĝojo hela
Alvenos iam tiu temp':

La amikec' kaj pura am'
Vin trafos, kvazaŭ glora pruvo,
Samkiel trafas bagnan truon
Sub ter' lontana ĉi deklam'.

Fin' de l' prizon' — ĉe solidar' ;
Katenoj pezaj baldaŭ falos
Kaj la libero ekbrilados,
Fordonos glavon la fratar'.





Aleksej Apuhtin (1840-1893)

Мухи

Мухи, как черные мысли, весь день
не дают мне покою:
Жалят, жужжат и кружатся над
бедной моей головою!
Стонишь одну со щеки, а на глаз уж
уселась другая,
Некуда спрятаться, всюду царит
ненавистная стая,
Валится книга из рук, разговор
упадает, бледнея...
Эх, кабы вечер придвинулся! Эх,
кабы ночь поскорее!

Черные мысли, как мухи, всю ночь
не дают мне покою:
Жалят, язвят и кружатся над бедной
моей головою!
Только прогонишь одну, а уж в
сердце впиалась другая,-
Вся вспоминается жизнь, так
бесплодно в мечтах прожитая!
Хочешь забыть, разлюбить, а все
любишь сильнее и больше...
Эх! кабы ночь настоящая, вечная
ночь поскорее!

1873

Muŝoj

Samkiel sugestoj el nigro, la muŝoj min
tage turmentas,
Ne polmoj, sed pojnoj pikatas; en tut-
Universo ne ventas,
Forpelu la muŝon de vango, ekaŭdu ree
la zumon;
Tra insektaroj altrudaj apenaŭ videblas
la lumo,
Konversacio amika ne viglas kaj libro
tuj falas,
Ho, venu vespero kaj nokto! Ho, nokto,
al tago vi malas!

Samkiel sterkmuŝoj dikegaj, la pensoj
min nokte turmentas,
Enmense multajtoj rongatas; en mia
dezerto ne ventas,
Forpelu la penson elkore, ekaŭdu ree la
zumon:
La revoj plenaj je vano surdige sonadas
viv-sume.
Ne forgesblas fortaĵoj; la amo en puso
plu kalas.
Alvenu, la nokto totala! Al mia torturo
vi malas!



La majstro-malakitisto.



Paŭlo Baĵov

Paŭlo [Pavel Petroviĉ] Baĵov (1879 – 1950) estis fama rusa kaj sovetia verkisto, folkloristo. Li naskiĝis en la Urala regiono apud la urbo Ekaterinurgo en laborista familio. Li lernis en fabrika lernejo, kie estis la plej sukcesa lernanto, poste en eklezia lernejo, fininte kiun li fariĝis studento de eklezia seminario en la urbo Permo. En 1899 li sukcese finis kursojn de la seminario, kaj fariĝis instruisto de la rusa lingvo. Kolektis uralan folkloron. Verkista agado de Pavel Baĵov ekis en periodo de la intercivitana milito. Nome tiam li komencis labori kiel

ĵurnalisto. Poste li esploris historion de Uralo. Tamen por publiko li estis tre konata kiel aŭtoro de fantastaj historioj-sagaoj surbaze de folkloraj motivoj. Lia unua libro kun uralaj rakontoj, kiu nomiĝis "Uralaj okazaĵoj", estis eldonita en 1924. La unua sagao de Baĵov estis publikigita en 1936. Eldono de la libro "Malakita skatolo" (1939) tre forte influis al la sorto de la verkisto. Dank'al la libro li ricevis Stalin-premion (1941), kaj en 1944 oni lin dekoraciis per ordeno de Lenin pro efika literatura kreado. Paŭlo Baĵov kreis multajn verkojn, sur baze de kiuj oni surscenigis baletojn, operojn, spektaklojn, kaj kreis filmojn. La prezentata rakonto estas el la kolekto "Malakita skatolo".

Katerina – fianĉino de Danielo – restis fraŭlino. Post unu aŭ du jaroj, de kiam Danielo subite malaperis, ŝi iĝis maljuna por aĝo de fianĉino. Virgulinon kun pli ol dudekjara aĝo en nia regiono oni nomas ‘olda fraŭlino’. Junuloj malofte svatiĝas al tiaj inoj, sed vidvoj – pli ofte. Verŝajne Katerina estis tre bela, ĉar multaj fianĉoj direktis sin al ŝi. Sed ŝia respondo ĉiam estis jena:

– Mi promesis al Danielo.

Oni admonis ŝin:

– Ho ve! Via promeso nun ne necesas. Forgesu pri tio, ĉar jam delonge malaperis via fianĉo.

Sed Katerina ĉiam persistis en sia respondo:

– Mi promesis al Danielo. Kiu scias, povas esti li revenos.

Sed oni klarigis al ŝi:

– Sendube, li jam mortis.

Sed ŝi respondis:



– Neniu vidis lin mortinta, kaj por mi, certe, li estas viva.

Oni vidas, ke la junulino freneziĝis, kaj baldaŭ sin deturnis de ŝi. Tamen kelkaj personoj komencis moki ŝin: nomis ŝin fianĉino de Mortulo. Tiu nomo algluiĝis al ŝi, kvazaŭ alia nomo ne ekzistis.

Subite iu epidemio aperis inter homoj, kaj gepatroj de Katerina formortis. Ŝia parenkaro estis multa: tri fratoj kun siaj edzinoj, kaj kelkaj fratinoj kun siaj edzoj. Jen komenciĝis interbatalo: kiu okupos la loĝlokon de la gepatroj. Katerina ekrigardis al la malinda veto, kaj diris:

– Iros mi por loĝi en kabanon de Danielo. Lia patro, Prokopiĉ, iĝis maljuna, kaj mi zorgos pri li.

Ŝiaj gefratoj komencis admoni ŝin:

– Ne faru tion, fratino. Kvankam Prokopiĉ estas maljuna, tamen malbonaj onidiroj povas disvastiĝi.

– Por mi tute egalas – ŝi respondis. – Ne mi fariĝos klaĉulino. Prokopiĉ ne estas fremda al mi. Li estas adopta patro de mia Danielo. Mi nomos lin oĉjo.

La parencoj ne daŭre admonis ŝin. Ili kaŝe pensis – ju pli malmulta estas familio, des pli kvietas. Do, foriris Katerina. Sed al Prokopiĉ ekplaĉis la situacio:

– Dankon al vi, Katerina, ke vi rememoris pri mi.

Jen ili komencis kune vivi-loĝi. Prokopiĉ laboris ĉe ilmaŝino, kaj Katerina mastrumis jen en legomĝardeno, jen en kuirejo, kaj okupiĝis pri ceteraj laboroj. Ilia mastrumaĵo ne estis granda, kaj vigla Katerina ĉiam trovis tempon por okupiĝi pri manfarado: kudri, triki. Komence iliaj aferoj estis sukcesaj, sed poste sano de Prokopiĉ iĝis pli kaj pli malbona. Unu tagon li sidas sur seĝo, poste du tagojn kuŝas surlite. Por li estis malfacile labori pro granda aĝo. Jen Katerina komencis pripensi, kiel vivi plu.

"Nura virina manlaboro ne nutros ilin, sed alian metion ŝi ne posedas."

Jen ŝi diras al Prokopiĉ:

– Oĉjo! Instruu min pri via metio, almenaŭ pri io pli simpla.

Pro la peto Prokopiĉ eĉ ekridis:

– Kion vi diras?! Ĉu indas por junuluno prilabori malakiton! Neniam tio okazis.

Tamen ŝi komencis esplorrigardi al metio de Prokopiĉ. Kiel eble ŝi helpis al li: disseĝis kaj poluris ŝtonojn. Baldaŭ Prokopiĉ komencis al ŝi doni laboron por poluri ŝtonajn platetojn, fari tenilojn por forkoj, tranĉiloj, kaj aliajn aĵojn, kiuj ĉiam necesis al homoj. La laboro ne estis kvalita kaj multekosta, tamen tre helpis al li.

Sed Prokopiĉ ne longe vivis. Jen komencis gefratoj de Katerina denove admoni ŝin:

– Nun vi devas nepre edziniĝi. Kiel vi vivos sola?

Sed Katerina interrompis ilin:

– Tio ne estas via zorgo. Nenia fianĉo necesas al mi. Jen Danielo perfektigis en metio, kaj revenos al mi.

La gefratoj malkontente nur per la manoj svingis:

– Katerina, ĉu vi freneziĝis? Peke diri tion! Jam delonge mortis la homo, sed vi atendas lin! Povas okazi, ke li, kiel fantomo, logos vin.

– Mi ne timas tion – ŝi respondis.

Tiam la parencoj demandis:

– Per kio vi vivtenos vin?

– Pri tio vi ne zorgu. – ŝi respondis. – Mi mem helpos min.

La gefratoj komprenis, ke Prokopiĉ lasis post si kelke da mono, kaj daŭrigis admoni:

– Jen stultulino! Se estas mono, tiam necesas viro en la hejmo. Se aperos iu por forpreni la monon, li tuj rompos vian kolon kiel la kokidan, kaj adiaŭ la vivo.

– Kiom da jaroj la sorto destino al mi, tiom mi travivos.

La gefratoj ankoraŭ longe bruis. Iuj admonis, iuj ploris, sed Katerina aŭskultis nenium.

– Mi memstare eltenos ĉion. Nenia via fianĉo necesas al mi. Mi jam delonge havas tiun.

La parencoj ekkoleris:

– Tiam por helpo ne turnu vin al ni!

– Dankon, – ŝi respondis, – karaj gefratoj! Mi memoros tion. Tamen ankaŭ vi memoru – preterpaŝu min!

Ŝi ekridis. La parencoj brue fermis la pordon, kaj tuj foriris. Katerina restis sola. Komence ŝi ploris, sed poste eldiris:

– Ne esperu, ke mi cedos!

Ŝi forviŝis larmojn sur sia vizaĝo, kaj komencis fari purecon en sia hejmo. Kiam ŝi finis la laboron, tuj sidis sin ĉe ilmaŝino. Tie estu sia ordo: malnecesajn aĵojn – flanken, sed la konstante necesaj troviĝu apude. Ĉion ordigis, kaj jam intencis labori: "mi mem provos poluri almenaŭ unu platon", sed subite ŝi rimarkis, ke mankas laŭmezura ŝtono. Pecetoj de datur-taso de Danielo restis, sed Katerina zorge konservis tiujn en speciala por tio pako. Ŝtonoj de Prokopiĉ estis multaj, sed tiuj estis grandaj, ĉar li ĉiam faris ampleksajn aĵojn. Pli-malpli etaj ŝtonoj jam finiĝis. Jen Katerina pensas:

"Ŝajnas, ke necesas iri al ercminejo por trovi pli-malpli konvenan ŝtoneton."

Danielo kaj Prokopiĉ iam diris, ke ili ĉiam trovis la ŝtonojn ĉe la Serpenta monteto. Jen tien ŝi sin direktis.

En la loko Gumeŝki ĉiam troviĝis multaj homoj: iuj elterigis ercon, iuj transportis tiun. Oni rigardis scivoleme al Katerina – kien ŝi iras kun korbo. Al Katerina ne plaĉis, ke oni gapas ŝin. Pro tio ŝi decidis ne serĉi la ŝtonon ĉe ruboj, sed ĉirkaŭiris la Serpantan monteton, kaj tra arbaro atingis ĝian supron. Sidas ŝi sur ŝtono kun larmoj en la okuloj, malĝoja, kaj rememoras Danielon. Neniu ĝenas ŝin en senhoma arbaro, nur la larmoj gutas sur la teron. Finis Katerina plori, kaj tuj rimarkis, ke ĉe ŝia piedo mem malakit-ŝtono kuŝas, duonkovrita de tero. Sed kiel elterigi ĝin, se mankas pikpioĉo aŭ rompostango? Katerina permane ekmovis ĝin, kaj rimarkis, ke tiu ne forte estas fiksita. Ŝi komencis per vergo forĝeti teron ĉirkaŭ la ŝtono, kaj ŝanceli ĝin. Subite io krevis de malsupre, simile al sono de rompiĝanta branĉeto, kaj defalis peco de la ŝtono. La peco



ne estis granda, en formo de plateto. Ĝi estis je tri fingroj dika, vasta kie l manplato, kaj longa je du kvaronoj de la dimensio. Katerina eĉ ekmiris.

– Ĝuste tio, kio necesas al mi. Se dissegi ĝin, estos produktitaj multaj platetoj sen multaj restaĵoj.

Ŝi alportis la ŝtoneton en la hejmon, kaj komencis dissegi tiun. La laboro ne estas rapida, Katerina devas ankaŭ mastrumi. Do, ŝi estis okupita tutan tagon.

Kiam ŝi sidigas sin ĉe ilmaŝino, ĉiam tuj rememoras Danielon.

– Se Danielo rigardus, kia nova majstro aperis, kiu sidas sur lia kaj Prokopič loko!

Certe, ĉiam ekzistis fiuloj. Sen tiuj ne eblas... Antaŭ iu festo, vespere, sidas Katerina ĉe la ilmaŝino, sed tri junuloj transgrimpis ŝian barilon. Ĉu tenti ili volis aŭ planis ion alian – ilia afero, nur ĉiuj estis ebriaj. Katerina pro bruo de segado ne aŭdis, ke homoj aperis sur perono. Ŝi nur tiam rimarkis la fiulojn, kiam tiuj penis penetri en la kabanon.

– Malfermu pordon, fianĉino de Mortulo! Invitu vivajn gastojn!

Katerina komence admonis ilin:

– Foriru, junuloj!

Sed ili aŭskultas nenion, batas kontraŭ la pordo, kvazaŭ volas difekti tiun.

Jen Katerina malŝlosis la pordon kaj krias:

– Eniru, kiu unua estos batita?

La junuloj vidas, ke ŝi staras kun hakilo enmane.

– Vi ne ŝercu! – ili diras.

– Kiaj ŝercoj! – ŝi respondas, – kiu transiros la sojlon, tiu ricevos baton kontraŭ la frunto!

La junuloj estis ebriaj, tamen vidas, ke la situacio estas serioza. Katerina estas plenaĝa, la vastaj ŝultroj, la akreca okulo, kaj spertas pri hakado. Ili ne kuraĝis eniri en la kabanon. Ili iomete diboĉis, kaj poste foriris, kaj rakontis al ĉiuj pri la okazaĵo. Post tio oni komencis moki ilin, ke tri junuloj kuris for de unu junulino. Certe, tio ne ekplaĉis al la junuloj, kaj ili komencis mensogi, ke Katerina ne estis sola, sed malantaŭ ŝi la mortulo staris, kaj tia terura, ke volevole oni forkuros.

Ĉu oni kredis, aŭ ne kredis pri tio, sed de tiam onidiro aperis, ke malbona spirito troviĝas en la kabano, kaj jen tial ŝi loĝas sola.

La onidiro atingis Katerina-n, sed ŝi ne malĝojis pro tio. Ŝi pensis:

– Oni babiladu. Por mi estos bone, se oni timiĝos pro tio, kaj lasos min en kvieto.

Najbaroj ankaŭ miris, ke ŝi laboras ĉe ilmaŝino. Ili mokis:

– Ne por virino estas la metio! Kion ŝi kapablos produkti?!

Pro tiuj ofendaj vortoj dubo okupis Katerin-on. Iafoje ŝi pensis:

– Ĉu mi sukcesos?

Tamen finfine ŝi ekposedis kuraĝon:

– Bazara varo! Ĉu mi ne sukcesos produkti ĝin almenaŭ kun eta kvalito?



Katerina dissegis la ŝtoneton, kaj ekvidis tre belan ornamon, kaj lokon kie necesas laŭlarĝe segi. Ekmiris Katerina, ke lerte ŝi faris tion, kaj komencis poluri. La afero ne tre kvalitas, sed sen sperto ne estos sukceso. Komence estis malfacile, sed poste ŝi progresis en la afero. La platetoj estis faritaj tre bonaj, kaj restaĵoj preskaŭ forestis.

Katerina faris kelke da platetoj, kaj ankoraŭfoje ekmiris, ke kia estis bona ŝtoneto, kaj komencis pensi, kien forporti la faraĵojn. Prokopiĉ ĉiam veturigis la similajn faraĵojn en urbon, kaj tie lasis tiujn en sama butikon. Ŝi multfoje aŭdis pri la butikon, kaj decidis viziti la urbon.

– Mi demandos, ĉu oni akceptos miajn faraĵojn.

Ŝi ŝlisis la pordon de sia kabano, kaj ekiris perpiede. Neniu rimarkis, ke ŝi foriris en la urbon. Katerina eksciis, kie troviĝas tiu mastro, kiu akceptis la faraĵojn de Prokopiĉ, kaj vizitis la butikon. Katerina vidas, ke la butikon estas plena da diversaj ŝtonoj, kaj multaj malakitaj ŝtonoj kuŝas en ŝranko post vitroj. En la butikon homoj svarmas. Kelkaj personoj aĉetas, kelkaj lasas faraĵojn. La mastro aspektas grava kaj severa.

Katerina komence eĉ timis aliri al li, poste kuraĝiĝis kaj demandis:

– Ĉu necesas al vi malakitaj platetoj?

La mastro la fingron direktis al la ŝranko:

– Cu vi vidas, ke tre multas similaj faraĵoj?

Majstroj, kiuj lasis siajn faraĵojn, konsentiĝas kun li:

– Aperis tro multaj majstroj kun la faraĵoj. Ili nur difektas la ŝtonetojn, kaj ne komprenas, ke por plateto necesas bona ornamo.

Unu majstro, kiu konis Katerina-n, mallaŭte diras al la mastro:

– Stulta estas la junulino. Najbaroj vidis ŝin ĉe ilmaŝino. Sendube ŝi estas fuŝistino.

Tiam la mastro diras:

– Montru al mi, kion vi alportis.

Katerina prezentis al li sian plateton. La mastro komence rigardis al ĝi, poste al Katerin-on, kaj diris:

– De kiu vi ŝtelis la plateton?

Certe, Katerina ofendiĝis, kaj decideme respondis:

– Ĉu vi havas rajton tiele paroli pri homo, kiun vi ne konas? Rigardu, se vi ne estas blinda! De kiu oni povas forŝteli tiom da platetoj kun la sama ornamo? Nu, respondu!

Ŝi tuj demonstris siajn faraĵojn sur butiktablo.

La mastro kaj majstroj vidas, ke ĉiuj platetoj havas la saman ornamon. La ornamo tre belas: kvazaŭ meze vidiĝas arbo, kaj supre sur branĉo birdo sidas, kaj malsupre ankoraŭ unu birdo. La ornamo estas klara, kaj majstre polurita.

Vizitantoj aŭdis la interparoladon, kaj ekvolis ankaŭ rigardi la platetojn. Sed la mastro tuj kovris la faraĵojn:

– Amase ili malbone estas vidataj. Nun mi dismetos tiujn post vitro, kaj poste vi elektu tion, kio plaĉas al vi.

Li diras al Katerina:





– Trairu jenan pordon. Nun vi monon ricevos.

Iris Katerina, kaj la mastro post ŝi. Li fermis la pordon, kaj demandis:

– Kiom da mono vi volas?

Katerina konis prezojn dank'al Prokopiĉ. Ŝi eldiris tiujn, kaj la mastro ekridis:

– Ha, kion vi diras! Por la prezoj mi pagis nur al majstro Prokopiĉ kaj ankaŭ al lia

adoptito Danielo. Sed ili estis tre lertaj majstroj!

– Mi aŭdis pri ili – ŝi respondis. – Mi estas el la sama familio.

– Jen kio! – ekmiris la majstro. – Verŝajne ĉe vi restis faraĵoj de Danielo.

– Ne, – ŝi respondis, – estas la miaj.

– Probable li lasis malakitan ŝtonon.

– Ne, la ŝtonon ankaŭ mi elterigis.

Ŝajne la majstro ne kredis, sed finis interdisputon, inde pagis kaj diris:

– Se vi faros similaĵon, do alvenu. Mi garantie prenos ĉion, kaj bone

pagos.

Katerina foriris kaj ĝojis, ke ricevis multe da mono. La mastro kuŝigis la platetojn post vitro. Aĉetantoj alvenis:

– Kiom?

Li, certe, ne eraris, – dekoblan prezon fiksas por la vendataj platetoj, kaj ankaŭ diris:

– Tia bela ornamo ankoraŭ ne estis, ĉar faraĵo apartenas al Danielo mem.

Neniu pli bone faros tion.

Katerina alvenis en la hejmon, kaj miras:

– Jen kia okazo! Miaj platetoj estis plej belaj! Ankaŭ la ŝtoneto estis bona.

Verŝajne feliĉa okazaĵo vizitis min.

Sed poste ekpensis:

– Ĉu, povas esti, Danielo sendis signalon al mi?

Pro tiu penso ŝi tuj ekkuris al la Serpenta monteto.

Jen tiu malakitisto, kiu volis konfuzigi Katerin-on antaŭ la urba mastro, ankaŭ revenis hejmen. Li enviis, ke Katerina trovis ŝtonon kun tre rara ornamo. Li elpensis:

– Necesas observi Katerina-n, kie ŝi la ŝtoneton elterigis. Ĉu iun novan lokon Prokopiĉ aŭ Danielo montris al ŝi?

Li rimarkis, ke Katerina ekkuris ien, kaj tuj sekvis ŝin. Li vidas, ke ŝi preteriris Gumeŝki-n, kaj direktis sin al la Serpenta monteto. La malakitisto iras en la sama direkto, kaj pensas:

– Tie troviĝas arbaro, pro tio mi nerimarkeble trafos en la necesan lokon.

Ili ambaŭ atingis la arbaron. Katerina ne estas tre singarda, nek ĉirkaŭrigardis, nek atente aŭskultis. La majstro ĝojis, ke li akiras novan lokon por elterigi ŝtonojn. Subite deflanke io ekbruis, kaj tiel, ke la majstro ektimis kaj tuj haltis. Kio okazis? Dum li klarigis situacion, Katerina malaperis el la vidkampo. Daŭre li senrezulte kuris tien-reen tra la arbaro, ĝis kiam kun malfacilaĵo atingis la Nordan stavon, kiu situis je du verstoj de Gumeŝki.

Katerina eĉ ne suspektis, ke iu kaŝe rigardas ŝin. Ŝi atingis montopinton kaj la lokon, kie elterigis unuan ŝtoneton. La kaveto iĝis iomete pli granda, kaj

flanke troviĝis simila ŝtoneto. Katerina iomete ŝancelis ĝin, kaj tiu tuj deapartiĝis de tero. Denove la ŝtoneto krevis de malsupre kiel rompiĝanta branĉeto. Katerina prenis la ŝtoneton, kaj ekploris kun lamento, simile al virinoj, kiuj plorkrias pri mortinto.

– Kial vi lasis min, bonkora amiko, – kaj veas plu...

Katerina finis plori kaj lamenti, faciligis la animon. Ŝi enpense staris kaj rigardis en direkto al loko, kie oni elterigas ercon. Ĉirkaŭe estis densa, alta arbaro, sed en tiu loko ĝi iĝis pli maldensa. Vesperiĝis. Malsupre de la arbaro sur eta maldensejo jam preskaŭ mallumiĝis, sed en la mineja loko la suno ankoraŭ forte lumis. Estis hela la loko, kaj tie ĉiuj ŝtonetoj blietas.

Scivolemo ekposedis Katerina-n. Ŝi ekvolis proksimiĝi, faris unu paŝon, sed sub la piedo io krakis. Ŝi retiris la piedon, kaj vidis, ke tero malaperis sub la piedoj. Katerina staris sur pinto de ia arbo. Ĉikaŭe troviĝis similaj arbobopintoj, kaj malsupre inter arboj vidiĝis herboj kaj floroj, kiuj ne similis al la lokaj.

Alia virino, ne Katerina, tuj ektimus, komencus krii, sed ŝi pensis tute pri alio:

– Jen la monto malfermiĝis! Se mi povus vidi Danielo-n!

Nur ŝi ekpensis pri tio, kaj tuj ekvidis, ke inter arboj iu iras, simila al Danielo, kaj supren etendas la manojn, kvazaŭ volas diri ion. Katerina tuj ĵetiĝis al li ...de sur la arbo! Sed falis ŝi sur saman lokon, kie staris. Poste ŝi prudentiĝis kaj diris al si mem:

– Ŝajnas, ke iu tentas min. Necesas iri hejmen.

Iri necesas, sed ŝi sidas senmove, kaj atendas, ĉu ankoraŭfoje malkovriĝos la monto, kaj aperos denove Danielo. Tiel sidis ŝi ĝis mallumo, nur ekde tiam iris al la hejmo. Iras Katerina kaj pensas:

– Tamen mi ekvidis mian Danielo-n.

En tiu tempo, majstro, kiu kaŝe observis Katerina-n, aliris al ŝia domo. La pordo estis ŝlosita. Li kaŝis sin por vidi kion ŝi alportos en la hejmon. Post kelka tempo li ekvidis Katerina-n, kaj baris la vojon.

– Kien vi iris?

– Al la Serpenta monteto – ŝi respondis.

– Nokte. Kion vi faris tie?

– Por rigardi Danielo-n.

La majstro tuj flankenĵetiĝis, kaj en sekva tago en fabriko disvastiĝis onidiro:

– Tute freneziĝis la fianĉino de Mortulo. Nokte ŝi vizitas la Serepantan monteton, atendas la mortulon. Probable tiu frenezulino ankaŭ povas forbruligi la fabrikon.

Kiam la gefratoj ekaŭdis tion, denove alkuris por insulti kaj admoni Katerina-n. Sed ŝi eĉ ne volis aŭskulti, nur montris la monon al ili, kaj diris:



– Kiel vi opinias, de kie aperis la mono? Oni ne ĉiam prenas faraĵon de spertaj majstroj, sed al mi tiam da mono tuj donis por unua laboraĵo! Kial?

La gefratoj aŭdis pri ŝia sukceso, kaj diris:

– Sendube, nur feliĉa hazardo.

– La hazardoj, – ŝi respondis, – ne okazas.

Danielo mem kaŝe metis tiun ŝtonon al mi, kaj la ornamon faris.

La fratoj nur ridas, kaj fratinoj mire svingas la manojn:

– Sendube ŝi frenezigiĝis! Necesas averti komizon, ke ŝi povas ekbruligi la fabrikon!

Certe ili ne eldiris tion, ĉar hontis perŝi la fratinojn. Ili nur eliris el ŝia kabano, kaj interkonsentis:

– Necesas observi Katerina-n. Se ŝi ien foriras, tuj oni sekvu ŝin.

Katerina adiaŭis al la parencoj, ŝlosis la pordon, kaj komencis dissegi la ŝtonon. Ŝi laboras kaj pensas:

– Se denove estos bona ŝtono, tiam mi reale vidis Danielo-n.

Jen ŝi rapidas dissegi, ĉar volas ekvidi, kia ornamo aperos. Jam delonge noktigiĝis, sed Katerina sidas ĉe ilmaŝino. Unu fratino vekigiĝis en tiu tempo, ekvidis lumon en la kabano, alkuris al fenestro, rigardas tra fendo de ŝuto, kaj miras:

– Ankaŭ sonĝo ne venkas ŝin! Zorgoj pro ŝi!

Katerina desegis parton de la ŝtono, kaj aperis ornamo pli bela ol la antaŭa: birdo desur arbo flugas kun disfalditaj flugiloj, kaj de malsupre renkonten al ĝi flugas alia birdo. Kvinfoje la ornamo ripetiĝis, kaj loko estas fiksita kie necesas segi laŭlarĝe. Post tio Katerina eĉ ne dubis, kaj tuj ekkuris ien. La fratino sekvis ŝin, kaj samtempe vokis la fratojn:

– Rapide postkuru ŝin!

Elkuris la fratoj, kaj ankaŭ vokas homojn. Jam heliĝis. Ili vidas, ke Katerina preterkuras Gumeŝki-n. Ĉiuj kuras post ŝi, sed Katerina ŝajne ne vidas, ke la homoj sekvas ŝin. Ŝi preterkuras la minejon, kaj paŝis ĉirkaŭ la Serpenta monteto. La homoj por momento haltis por rigardi kion ŝi faros plu.

Katerina iris kiel kutime sur la monteton. Vidas ŝi, ke ĉirkaŭa arbaro estas neordinara. Katerina tuŝis permane arbon, sed ĝi estis malvarma kaj glata kiel polurita ŝtono, kaj herbo ankaŭ ŝajnis ŝtona en mallumo. Katerina pensas:

– Ŝajnas, ke mi trafis en la monteton.

Tiutempe la parencoj kun homoj tumultiĝis:

– Kien ŝi foriris? Ŝi ĵus estis tute apude, sed tuj malaperis!

Ĉiuj kuras tien-reen, jen sur la monteton, jen ĉirkaŭ la monteto, kaj kriis unu al la alia: "Ŝi ne estas vidata?"

Sed Katerina iras tra la ŝtona arbaro, kaj pensas pri tio kiel trovi Danielo-n. Post kelka tempo ŝi ekkriis:

– Danielo, respondu al voko!

En la arbaro subite io ekbruis, branĉetoj ekknaris: "Li forestas! Forestas!"

Sed Katerina daŭris voki:

– Danielo, respondu al voko!

Kaj denove estis respondo: "Li forestas! Forestas!"

Tamen Katerina vokas plu:

– Danielo, respondu al voko!



Jen Mastrino de la monteto aperis antaŭ Katerina.

– Vi por kio, – ŝi diras, – vizitis mian arbaron? Kio necesas al vi? Ĉu vi serĉas bonan ŝtonon? Prenu ĉiun ŝtonon, kaj tuj foriru!

Katerina respondas al ŝi:

– Ne necesas al mi via morta ŝtono! Revenigu al mi mian vivan Danielo-n! Kie vi kaŝas lin? Ĉu vi havas rajton allogi fremdajn fianĉojn?

Nu, kuraĝa junulino! Sen timo ŝi atakas Mastrino-n. Sed tiu indiferentas, kaj kviete staras:

– Kion vi diros plu?

– Redonu al mi Danielon! Vi kaŝas lin...

Mastrino ekridis kaj respondas:

– Ĉu vi, stultulino, scias kun kiu vi parolas?

– Mi ne estas blinda, – ŝi krias, – kaj vidas kun kiu parolas. Tamen mi ne timas vin, amrivalino, tute ne timas! Kiom ajn estu bone ĉi tie, sed Danielo strebas reveni al mi. Mi mem vidis. Nu, kion vi diros?

Mastrino respondas:

– Ni aŭskultu, kion li mem diros. Ĝis tiu momento en la arbaro estis mallume, sed subite ĉirkaŭe ĉio eklumiĝis. La herbo ekbrilis per diversaj fajretoj, kaj la arboj belaspektis. En maldensejo kreskis ŝtonaj floroj, super kiuj flugadis oraj abeloj. Tia beleco, ke indas eterne admiri la belan vidaĵon. Jen vidas Katerina, ke tra la arbaro kuras Danielo, rekte al ŝi. Katerina renkonte al li sin jetis: "Danielo!"

– Iomete atendu, – diris Mastrino kaj demandis:

– Nu, Danielo, elektu: se vi iros kun ŝi, tiam vi forgesos miajn posedaĵojn. Se vi restos ĉi tie, necesos forgesi ŝin kaj la homojn.

– Mi ne povas forgesi la homojn, – li respondis, – kaj ĉiuminute rememoras ŝin.

Jen Mastrino kore ekridetis kaj diras:

– Estu tiel, Katerina! Prenu vian majstron. Pro via kuraĝo kaj persisteco jen al vi donaco. En memoro de Danielo restu ĉio pri mia vizito. Tamen jen tion li tute forgesu! – Kaj la maldensejo kun mirindaj floroj tuj mallumiĝis.

– Nun iru tiu ĉi direkton, – montris Mastrino, – kaj aldonis:

– Vi, Danielo, ne rakontu pri la monto al la homoj, nur diru, ke vi vizitis malproksiman majstron por perfektigi pri la metio. Vi, Katerina, ne pensu, ke mi tentis vian fianĉon, ĉar li mem alvenis por tio, pri kio nun forgesis.

Katerina riverencis:

– Pardonu min pro miaj malbonaj vortoj!

– Ne maltrankviliĝu, ĉar mi estas ŝtona! Sed inter vi ĉiam estu varmaj rilatoj.

Katerina kun Danielo ekiris tra la arbaro, kiu fariĝis pli kaj pli malluma, kaj sub la piedoj kuŝis multaj malglataĵoj kaj kavoj. Jen ili vidas, ke troviĝas en ercejo Gumeŝki. Homoj forestas, ĉar ankoraŭ estis tre frue. Ili kviete atingis la hejmon. Sed tiuj homoj, kiuj kuris post Katerina, ankoraŭ vagadis en la arbaro, kaj kriis: "Ĉu vi vidas ŝin?"

Longe oni serĉis Katerina-n, sed



malsukcesis. Revenis ili hejmen, kaj vidas Daniel-on sidi ĉe fenestro.

Komence ili timis, eligis diversajn sorĉparolojn, sed poste vidas, ke Danielo pipon plenigas per tabako, tuj deflankiĝis.

Ili pensis: "Mortuloj ne fumas pipojn".

Komencis la homoj unu post la alia proksimiĝi al Danielo, kaj vidas, ke ankaŭ Katerina troviĝas en la kabano. Ŝi tre gaja klopodas ĉe la forno. Dum longa tempo oni ne vidis ŝin tia ĝoja. Post tio la homoj kuraĝiĝis, eniris en la kabanon, kaj komencis demandi:

– Kial vi, Danielo, dum longa tempo forestis?

– En la vilaĝon Kolivanj mi iris. Aŭdis mi pri tiea tre sperta majstro-ŝtonisto, kaj decidis perfektiĝi pri metio ĉe li. Mia patro, kiam estis viva, deadmonis min, sed mi kaŝe foriris, nur al Katerina diris pri tio.

– Kial vi vian datur-tason disbatis?

– Nu, vespere alvenis hejmen... Ŝajnas, ke tro ebriiĝis... Ne ekplaĉis la taso, kaj mi disbatis ĝin. Tio povas okazi kun ĉiu majstro, vi mem sciu pri tio.

Jen la gefratoj demandas Katerina-n:

– Kial vi ne diris pri Kolivanj.

Sed Katerina ne estis parolema:


– Ne al vi indas juĝi pri tio. Multfoje mi diris al vi, ke Danielo estas viva, sed vi fianĉojn subŝovis al mi. Ne demandu, sed sidiĝu apud la tablo, ĉar por vi ovajo jam estas bakita.

Per tio demandoj finiĝis. Dum kelka tempo sidis la parencaro, babiladis pri tio kaj alio, kaj poste disiris al siaj hejmoj. Vespere Danielo alvenis al komizo. Ne longe estis malkontenta la komizo, kaj baldaŭ la konflikto estis elĉerpita.

Jen de tiam komencis kune vivi Danielo kaj Katerina en sia kabano. Oni diras, ke ili feliĉe vivis. En laborejo oni nomis Danielo-n majstro-malakitisto. Neniu povis konkuri kun li. Ankaŭ bonstato aperis en ilia hejmo. Tamen de temp' al tempo estas momentoj, kiam Danielo profunde enpenŝiĝas pri io. Pri kio, Katerina certe konjektis, sed silentis.

Esperantigis Gennadij Ŝlepĉenko (Vladivostoko)





Vivresumo de la originala poezia kreado

Eldonejo "Impeto" aperigis la libron de Valentin Melnikov «Ni vivas malgraŭ ĉio» (Moskvo, 2021, 72 paĝoj, ISBN 978-5-7161-0313-9).

Valentin Melnikov estas tre konata 63-jaraĝa moskva esperantisto, partoprenanta la komunumon ekde 1982. Liaj tradukoj el rusaj (kaj ne nur) poetoj aperadis en diversaj revuoj, kaj konsistigas ampeksan antologion, la plej granda lia atingo estas plena traduko de "Eŭgeno Onegin" far Puŝkin. Li abunde verkas recenzojn en diversaj periodaĵoj, kaj estas nun unu el la plej grandaj fakuloj en

Rusio pri Esperanto-kulturo. Li estas membro de Akademio de Esperanto.

Krom tradukoj, li foj-foje turnis sin ankaŭ al la originala verkado, kaj liaj poeziaj lirikaĵoj kaj humuraĵoj aperadis kaj en gazetoj, kaj en kolektivaj kolektoj kaj antologioj ("Moskvaro", "Moskvaj sonoriloj" ka.). Nun la plej gravaj liaj poemoj plus tri malgrandaj prozaĵoj estas kolektitaj sub unu kovrilo. Fakte, la libro estas siaspeca resumo de la pli ol 30-jara originala kreado de la aŭtoro.

Plejparto de la poemoj estas verkitaj antaŭ longa tempo, kaj ne estas facile konatiĝeblaj por nuntempa leganto. Tial tiu kolekto estas tre utila por ĉiu poeziŝatanto, kaj donas plenan impreson pri lia talento, kaj ĝi nepre rekomendendas por ĉiu legema esperantisto, por havi ĝin sur sia breto.

La libro akireblas kontraŭ 220 rubloj ĉe la eldonejo: http://lernolibro.ru/ni_vivas.

Tria volumo de tradukoj de Sergej Rublov

Rusa poezio en tradukoj de Sergej Rublov. Kolekto de poemtradukoj al Esperanto. Aŭtoro – kompilinto kaj tradukinto S.Rublov. Redakta kolegio V.V.Samodaj, V.V.Melnikov, M.C.Bronshhejn Jaroslavl, Filigran', 2020, - 298 p. ISBN 9878-5-6045659-2-6

"Tradukoj el la Arĝenta Epoko de la rusa poezio kaj sovetiaj poetoj kuŝis en tirkestoj dum duonjarcento. La publikigo okazis dank' al grava helpo de

esperantistoj. Ni espimas grandan dankon al Vladimir Samodaj, Valentin Melnikov kaj Mikaelo Bronŝtejn".

Vadim Rublov (la filo de la S.G.Rublov)

En la prefaco tre detale verkita de V.V.Samodaj estas prilumita vivo kaj E-agado de Sergej Rublov, kiun V.V.Samodaj konis persone. Krom aktiva E-agado kaj tradukado, S. Rublov estas aŭtoro de:

– Kvanta analizo de esperantaj radikoj;

– Kvalita analizo de esperantaj radikoj;

– duvoluma lernolibro "Esperanto-Rondeto";

– Struktura vortaro de Esperanto;

– Sistema vortaro de Esperanto;

– Laŭsona vortaro de Esperanto;

– Poeziaj rimedoj de Esperanto;

– Leksikono de proksimaj formoj por studo kaj poezio;

– Leksikono de falsaj tradukoj; Fruaj jaroj de Esperanto en Odeso;

– Tri skizoj pri Esperanto (Interlingvistiko, Esperantologio, Estiĝo de Esperanto)

El tiuj laboraĵoj estas eldonita libroforme preskaŭ nenio.


Nuna libro kompletigas la kolekton de poeziaj verkoj de ruslingvaj poetoj. Inter ili vi trovos tradukojn el M. Gorjkij, Saŝa Ĉornij, A. Bunin, K. Balmont, A. Blok, V. Brjusov, A. Aĥmatova, S. Jesenin, V. Majakovskij, S. Marŝak, V. Lebedev-Kumaĉ, Je. Jevtushenko k.a.

Dum sia vivo S.Rublov ne povis eldoni siajn verkojn. Por ke ili ne pereu, li multon kopiadis (mane!) en dek ekzempleroj kaj sendadis al siaj amikoj.

Grandan dankon meritas lia filo Vadim Rublov, ke li savis tiun trezoron, eldoninte nun iujn poeziajn tradukojn de sia elstara patro.

Bedaurinde la libro paperforme ne estas akirebla. Pro altaj kostoj ĝi aperis en eta kvanto. Kun anticipa interkonsento kun V.S. Rublov kaj antaŭĝiro de 300 rubloj al lia karto li sendos al interesotoj la elektronikan varianton.

Tamen, la antaŭan eldonon ni havas en suficha kvanto. Bonvolu turni vin al Svetlana Smetanina: svsmetanina@yandex.ru





Super la enirejo Galeria
Kun maskoj staras ĉarma paro dia.
Enestas, vere, io parodia
En maskobal' neordinara tia.
Ĉu ne la dioj movas l'temporadon?
Ĉu ili devas gvidi la paradon
Kun maskoj, kiuj lezas la spiradon,
Apenaŭ permesante palavradon?
Toleras tamen l' paro anemia,
Umanta en la mondo pandemia.
Kompatas – batas arde koro mia,
Ja ankaŭ min nun ŝirmas masko fia!

Mikaelo Bronŝtejn

CERBE kaj KORE

n-ro 19 (87), aprilo 2021

Kultura suplemento al la revuo "Ponto" n-ro 118

*"Ponto" estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo "Rusia Esperantista Unio
Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe de
ĝusta indiko de la fonto*

CkK atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, instru-metodikajn kaj sciencopopularajn kontribuojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru.

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktofino 12.04.2021